

Jarkunveno de Kultura Centro Esperantista
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 598, 1975.03.26 & 29

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni raportis pri la inaŭguro de la sekretario kaj gastejo de Kultura Centro Esperantista starigitaj en la urbo La Chaux-de-Fonds. Tiu renkontiĝo okazis la dimanĉan matenon 16-an de februaro. Ĝin sekvis posttagmeze Jar-kunveno de KCE. Laŭ nia promeso ni hodiaŭ raportas pri tiu kunsido kaj pri la rezolucioj, kiujn ĝi akceptis.

A.- Tiu Jar-Kunveno de Kultura Centro Esperantista grupigis kvardekon da personoj venintaj el tuta Svislando kaj el Italio, Britio kaj Hungario. Ĝin prezidis d-ro August Braun, la prezidanto de KCE. Kiel sekretario de KCE mia edzo raportis pri la laboro efektivigita de KCE dum la ses pasintaj monatoj. Temis antaŭ ĉio, apud la rutina laboro, pri kontaktoj kun la aŭtoritatoj, pri diskutoj kun fakuloj en la celo realisme ekzameni la eblecojn, antaŭ kiuj troviĝas KCE. Li ankaŭ diris, ke pli kaj pli li estas ĉirkaŭata de kunlaborantoj kaj li salutis briton, sinjoron Frank Rogers, kiu venis proponi sian helpon por periodo de kvin semajnoj, kaj kiu revenis kunlabori dum pluraj monatoj.

Cl.- La financa situacio de KCE, laŭ la raportoj de la Financa Komisiono kaj de la kaskontrolantoj, estas kuraĝiga. KCE ricevis dum 1974 donacojn por sumo de svisaj frankoj 15'400.- kaj por la unua fojo subvenciojn por sumo de frankoj 4'300. Malkreskis la kapitalo, ĉar por la starigo de la sekretario kaj de la gastejo estis faritaj multaj elspezoj, sed fakte temas pri investado, kiu permesos novajn paŝojn antaŭen dum la venontaj jaroj. La libro-servo estas baldaŭ senŝulda. La inventario je la 31-a de decembro 1974 indikis libro-stokon por sumo de svisaj frankoj 23'500. La vendoj atingis dum la jaro 1974 frankojn 7'960.

A.- La Centra Komitato, kiu konsistas el d-ro August Braun, prezidanto, s-ro René-William Perrenoud, vicprezidanto-kasisto kaj mia edzo Claude Gacond, sekretario, estis reelektita.

Cl.- Jen propono, kies celo estas la starigo de gastejo por kongresanoj: KCE starigas gastejon por kongresanoj, kies regularo donas uz-preferon unue al Internacia FERIA Altlernejo kaj due al esperanto-organizaĵoj. La starigo de tiu gastejo por kongresanoj obeas al la ĉisekvaj principoj : Emisio de prunto, kies celo estas la aĉeto de domoj aŭ loĝejoj facile transformeblaj al gastejo por kongresanoj. La tiel akiritaj loĝejoj restas okupitaj de luantoj ĝis repago de la koncernaj pruntoj. Provo rikolti donacojn kaj subvencojn en la celo rapidigi la repagon de la pruntoj, ekipi la senŝuldajn loĝejojn sub formo de ĉambroj unu- aŭ du-litaj kun fluanta akvo kaj konstrui la necesajn kolektivajn kunvenejojn. Okupiĝas pri la administrado kaj konstruado de tiu gastejo **Fondaĵo por Gastejo Edmond Privat**. En la franca lingvo : **Fondation pour le Foyer Edmond Privat**. En la statuto de KCE paragrafo precizigas la rilatojn inter KCE kaj la fondaĵo por Gastejo Edmond Privat. Tiu propono estis unuanime akceptita.

A.- S-ro André Sandoz, prezidinto de la urbo La Chaux-de-Fonds kaj eksmembro de la Registaro de la Respubliko kaj Kantono Neuchâtel, kiu akceptis fariĝi prezidanto de la kreota Fondaĵo por la Gastejo Edmond Privat, diris, ke li estis intima amiko de Edmond Privat. Li estas la prezidanto de la Fondaĵo Edmond Privat, kies kolektoj riĉigis la Bibliotekon de la urbo La Chaux-de-Fonds. Persone li ŝatas la nomon **Foyer Edmond Privat**, kiu estis proponita por la starigota gastejo. **Foyer**, kiu signifas **fajrujo kaj gastejo** enhavas ideon de disradiado. Li poste klarigis, kial estos necese krei fondaĵon por povi diskuti kun la aŭtoritatoj kaj administri la entreprenon.

Cl.- Dua propono anoncis kampanjon **Esperanto en la lernejojn**, kiun gvidas la instruisto Olivier Tzaut. Ĝi ricevis la apogon de multaj instruistoj kaj de lernejoj-estroj. Fonduso nutrata de neesperantistoj permesas salajri sekretarion. Tiu propono, kiu estis unuanime akceptita, tuj renkontis vastan eĥon en Romandio. La gazetaro, radio kaj televido jam detale raportis pri ĝi kaj formiĝas en pluraj kantonoj komisiono, kies rolo estos la regula kontaktado de la lernejoj aŭtoritatoj, ĝis kiam ili mem transprenos la entreprenitan laboron poresperantan.

A.- La Jarkunsido finiĝis per akcepto de 5 resolucioj. La unua montras, ke la multlingvismo estas malfavora al la Tria Mondo ; tri aliaj montras, ke Esperanto estas lingvo bone vivanta. Kontraŭe al la asertoj de kolokvo ĵus okazinta en Parizo, Esperanto taŭgas por la komunikado de la scienca penso kaj ĝia uzo en internaciaj kongresoj estas supera al tiu de simultana interpretado. La beletra rolo de Esperanto fariĝas pli kaj pli okulfrapa. La kvara resolucio rememorigas la lingvo-rolon de Esperanto kaj ĝi montras, ke asertoj, kiuj prezentas nian lingvon kiel sublingvon, estas insultaj por la infanoj kaj familioj, kiuj uzas la internacian lingvon kiel ĉiutagan lingvon. Fine lasta resolucio reliefigas, ke ofendaj diroj kontraŭ Esperanto estas fine ofendaj al la internaciaj organizaĵoj, al la ŝtatoj, al la universitatoj kaj al la poetoj, kiuj uzas Esperanton.

Cl.- Kiam ni posedos esperantigon de tiuj resolucioj, kiuj estis publikigitaj en la franca, ni legos al vi erojn el ili.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!